


KATEDRALO WROCŁAW

Katedralo el brikoj, ne el ŝtonoj!

Ĝenerale, grandaj edificioj datiĝantaj de mez-epoko, estas konstruitaj el ŝtonoj.

Bildo 1: En Parizo, la strukturo de la gotika Katedralo “Nia Damo” konsistas el ŝtono, kio videblas per ĝia koloro.



Bildo 2: fasado de la Katedralo Wroclaw: bone videblas brik-konstrukto ĉe la malalta parto kaj ĉe la dekstra turo.



La mezepokaj konstruistoj elektadis *malsamajn ŝton-materialojn* laŭ ilia funkcio: ĉu por pilieroj (kiuj devis rezisti precipe vertikalan pezo-premon) ĉu por volboj (kriterio de pezo) kaj tiel plu. En tia edificio, kia estas la Katedralo de Wrocław (Vroclavo) granda parto de la konstruaĵo konsistas el brikoj, kio estas rimarkinda.

La **Katedralo Sankta-Johano Baptisto** videblas en Vroclavo, ĉef-urbo de la regiono Malalta Silezio. Ĝi estis konstruita de la jaroj 1244 ĝis 1341. Tiam, unu jarcento ŝajnis normala por tut-fini tiom imponan konstruaĵon. kies turoj estas 98 metrojn altaj.

Bildo 3:

Absida
ensemblo,
kun verdaj
tegmentoj kaj
ruĝ-brikaj
muroj.

La konstru-
periodo
montras
malfruan
gotikan



stilon, kies malantaŭan parton povos admiri la vizitanto: triparta *absido*, kun nur ŝajne simetria dispono de la *absidetoj* ĉirkaŭ la *ĉorejo*. Verŝajne, la du flankaj absidetoj estis konstruitaj iom poste, kion montras la fenestroj post-gotikaj kaj la du *kupoloj* kovritaj per kupro-ladoj.



Tut-verŝajne, ĉe kelkaj konstrukto-partoj, necesis uzi ŝtonojn (ekzemple ĉe arkaĵoj) sed tiu materialo estis malofta kaj multe kosta en tiu regiono. Transporti pezajn ŝtonojn sur longa distanco ege komplikigis la aferon! Dum, briko estas facile produktebla materialo!

Bildo 4: Gotikaj arkaĵoj en la navo, sur kiuj konstruiĝis brikaj muroj.


Nun, ni rigardu kelkajn teknikajn punktojn, nome la metodon munti brikojn, videblan

ĉe la timpano supre de l'enirejo de sakristejo:



Bildo 5: Timpano skulptita en 1517, kie videblas la martirigo de Sankta Johano-Baptisto Sur plato, lia kapo, eltranĉita de Herod Antipas por plezurigi Salomean.

Dank'al tiu vidaĵo, eblas konvinkiĝi pri la metodo aranĝi brikojn ĉe la katedralo: Sur ĉiu brik-linio alternas, unu brik-o flank-montra, poste unu kver-montra, kaj tiel plu. . Ĉiuj brik-linioj estas muntitaj **karovice**, kio ebligas, ke neniuj vertikalaj juntoj (ejo de mortero) estu supre de alia. Tia muntado ebligis konstrui murojn je diversaj dikecoj: ĉu je 1-brik-longo, ĉu je $1 + \frac{1}{2}$, ĉu je du longoj, kaj tiel plu.



Bildo 6: skemo de brik-aranĝo

Fonto de bildoj kaj fotoj:
el Wikipedio